

Uvodnik

Številki na pot

## Uvodnik

Redno izhajanje biltena *Informacije / Informoj* je postalo nuja za obveščanje članov in somišljenikov ter prijateljev naše in drugih esperantskih organizacij, tudi preko meja naše države. Lahko si jih ogledate tudi na spletišču [www.esperanto.si](http://www.esperanto.si), kjer je med drugim na razpolago zbirka elektronskih številkl glasila za nekaj let nazaj in ta nudi udoben vpogled v dogajanja in podatke. Zaradi manjših stroškov naše glasilo v tiskani obliki pošiljamo po klasični pošti le članom, ki nimajo e-poštnih naslovov, ostalim pa elektronsko. Ti lahko seveda brezplačno dobijo tiskane izvode na srečanjih ali na posebno željo pri uredniku. Prijetno branje! *IO ZES*

Iz dejavnosti  
ZES

Izvajanje letnega programa dela

## Zamenhofov dan 2012

ZES in ETD Ljubljana vabita svoje člane, esperantiste iz vse Slovenije in prijatelje esperantskega gibanja na tradicionalno proslavo s krajšim kulturnim in strokovnim programom ter druženjem, ki bo

**v soboto, 15. decembra 2012 ob 10.00 uri**

v dvorani na Štefanovi 11 v Ljubljani. Ob tem srečanju se bomo spomnili letošnjih jubilejev in važnejših tekočih dogodkov, nabavili kako knjigo zase ali za podaritev, kupili znamke za božične in novoletne voščilnice, poravnali članarino in podobno. Zamenhofov dan je ena od dveh, treh letnih priložnosti, da se v večjem številu zberemo in neformalno pogovorimo ter poveselimo. Pridite z družino ali prijatelji, dogovorite se tistimi, ki težko potujejo, za skupen prevoz. Veseli bomo novih obrazov in starih, skoraj pozabljenih znancev.

Ĝis la revido!

## Preselitev arhiva ZES in ETD

Dolga leta, vse od izgube klubskega prostora v 1. nadstropju Hribarjeve hiše (arhitekt Maks Fabiani, 1903) na vogalu Tavčarjeve in Slovenske ceste v strogem centru Ljubljane, so se deli arhiva več organizacij ljubljanskih in slovenskih esperantistov hranili na raznih lokacijah po domovih in kletah posameznih funkcionarjev teh organizacij. Največji del tega gradiva je

bil v kartonskih škatlah v garaži pri Janezu Jugu. Arhiv je bil zato težko dostopen, ni bilo evidence vsebine, izgub in pridobitev, nekateri prostori so bili vlažni in so povzročali propadanje gradiva itd.

Letos poleti pa smo problem vsaj delno in začasno sanirali, ker nas je v to prisilila selitev mag. Juga v novo stanovanje in nujna izpraznitev njegove garaže. Gradivo v obsegu enega polnega kombija je bilo prepeljano najprej v sobico na Štefanovi 11, ki nam jo je čez poletje dala na razpolago četrtna skupnost Center. Tu je bil opravljen hiter pregled vsebine škatel, izločitev manj zanimivega gradiva, popis novo ugotovljenih zalog knjig in podobno.

Ko je četrtna skupnost sobo na Štefanovi 11 jeseni spet potrebovala za svoje dejavnosti, nam je ponudila majhen skladiščni prostor s kovinskimi policami na Grablovičevi ulici. To skladišče je kljub majhnosti zelo primerno, saj je suho in je pred njim velika pred-soba z mizami, kjer je možno arhiv pregledovati in urejati. Ponudbo smo z veseljem sprejeli in bomo skušali skleniti primerno pogodbo za daljši čas. Sledila je torej še ena selitev, nakladanje, razkladanje, odvoz odpadnega materiala itn.

Trenutno je torej večina arhiva v škatlah na policah v skladišču na Grablovičevi, zaloge knjig za prodajo so v eni omari na Štefanovi 9, knjižnični izvodi strokovne literature pa so v drugi omari pri Tomažu Longyki. Ob predvidenem prihodnjem pregledovanju in urejanju gradiva na Grablovičevi bomo dopolnili zaloge knjig, knjižnično gradivo ter popisali arhivsko gradivo. Z združenjem še ostalih fragmentov esperantskega arhiva bodo navedene kapacitete sicer verjetno kmalu polne, a vzpostavljen bo vsaj zadovoljiv nadzor nad gradivom.



Dve izmed novih knjig v zalogi za prodajo

Ob tej priliki je treba povedati imena oseb, ki so sodelovale pri tej na videz majhni, vsebinsko pa zelo pomembni in prav nič lahki ter hudo prašni akciji: Janez Jug, Ana Ferrer, Janez Zadavec, Mojca Zadavec, Tomaž Longyka in Ostoj Kristan. *O.K.*

## Srečanje na tromeji na Peči



Leseno znamenje za tromejo je tradicionalno E-zbirališče

Srečanje na tromeji na Peči nad Ratečami je bilo v nedeljo 9. septembra 2012 (po domače mu rečemo bolj ali manj upravičeno Trilanda). Esperantistov nas je bilo šest iz štirih držav (Elda Dörfler, Edvige Tantin Ackermann, Martin Stuppig, Roberto Maglica, Ana Ferrer in Janez Zadavec). Kljub glasni plesni glasbi smo izmenjali informacije o stanju esperantskega gibanja, se pogovarjali o možnosti organizacije esperantske konference Alpe - Jadran v Izoli ob sodelovanju ZES, ETD, TEA, občine in turističnega društva Izola ter sicer o medsebojnem sodelovanju. Lepo se je družiti s somišljeniki ob čudovitem vremenu na tako lepem mestu. *J.Z.*



Čudovito vreme, razkošen razgled in gneča na tromeji

## Statut ZES na spletu

Prenovljeni statut ZES, ki je bil sprejet na zasedanju skupščine 17. marca letos, je bil poslan tudi na pristojni organ Upravne enote Ljubljana. Ta ni imel pripomb nanj in ga je vzel v listinsko dokumentacijo naše organizacije, evidencial pa je tudi poslovni naslov na Štefanovi 9.

Novi statut je bil najprej objavljen v prvi letošnji (dvojni) številki našega glasila, zdaj pa je tudi na spletišču ZES, kjer je med drugim dana tudi povezava za dokument v obliki PDF za shranjevanje in tiskanje. V kratkem bosta tam na razpolago tudi posodobljeni pristopnici za nove individualne in kolektivne člane ZES. *O.K.*

## Esperanto v Brežicah

V okviru ponudbe izobraževanja za odrasle na Ljudski univerzi Krško je v začetku oktobra pričel z delom tudi poseben študijski krožek »Esperantska klepetalnica.« To zanimivo izobraževalno obliko financira Ministrstvo za znanost, kulturo, šolstvo in šport Republike Slovenije in spada v projekt »Študijski krožki«, ki ga razvija Andragoški center Slovenije.

Krožek gostuje na Ekonomski in trgovski šoli Brežice, kjer so zagotovljeni odlični pogoji za delo. Namen krožka je zbuditi zanimanje za širjenje uporabe esperanta v posavski regiji in gojiti ta lep, enostaven in zanimiv mednarodni jezik, tako pri starejši, kot tudi pri mlajši populaciji.

Tiha želja krožkarjev je med drugim tudi ustanovitev bodočega Kluba esperantistov Posavja, ki bi naj privabljal tako »stare« esperantiste, kot tudi tiste, ki z esperantom šele začenjajo in želijo poleg že pridobljenega znanja tujih jezikov dodati znanje široko uporabljivega esperantskega jezika. Tako bo komuniciranje s svetom še lažje. Načrtujejo tudi povezave z esperantisti iz obmejnih krajev Hrvaške in širše.

Krožkarji se učijo drug od drugega, pri tem pa spoznavajo posebnosti esperanta in doktrino esperantskega gibanja, vadijo medsebojno komunikacijo in se učijo uporabljati klasična in elektronska pomagala za samostojno učenje esperanta. Poleg tega združujejo koristnost s prijetnim druženjem in medsebojnim spoznavanjem.

Skupinica krožkarjev je še razmeroma majhna, vodi pa jo mentor mag. Anton Mihelič, upokojeni visokošolski učitelj in esperantist-samouk ter velik ljubitelj esperanta.

Delo krožka moralno podpira tudi vodstvo Zveze esperantistov Slovenije (ZES), katere predstavnik bo tudi gost na enem od prihodnjih srečanj krožkarjev-esperantistov. *A. M.*

## Sestanek IO ETD 16. oktobra 2012

Izvršilni odbor ETD Ljubljana je obravnaval kar široko paleto vprašanj iz tekočega poslovanja, pa tudi nekatere bolj dolgoročne zadeve. IO je sprejel stališče do organiziranja esperantske konference Alpe-Jadran leta 2013 (glej v rubriko *Komentiramo*).

Med akutnimi problemi je ureditev poštnega naslova oziroma preusmeritev pošte v nek operativni nabiralnik. V zvezi s tem je potrebna tudi prenova statuta ETD Ljubljana, ki naj bi ga predložili na prvem naslednjem zboru društva. Za pripravo predloga sprememb statuta je bil narejen sedanji statut v elektronski obliki s pomočjo OCR-obdelave papirne kopije originala.

Društvo naj bi tudi pridobilo status društva v javnem interesu, kar bi mu omogočilo pridobitev prostorov za delovanje in shranjevanje arhiva ter možnost prejemanja 0,5% dohodnine darovalcev prijateljev društva.

Sprejet je bil tudi predlog za formalno ureditev odnosov do ZES in sicer za pristop kot kolektivni član v ZES v smislu 6. do 12. člena novega statuta ZES. O.K.

## Učenje esperanta na lernu!

Zadnja leta so organizirani tečajji učenja esperanta pri nas prava redkost. Vzrok za to ni pomanjkanje učbenikov, prostorov in učiteljev, ampak prej pomanjkanje kandidatov za tako učenje. Marsikdo, ki si želi naučiti se esperanta, si pomaga s samoučenjem s pomočjo knjig, kaset, zgoščenk ali interneta. Zlasti zadnja pot je zanimiva, ker je poceni, praktična, tudi do neke mere interaktivna in multimedijaska.

Zato sem se odločil, da osebno preizkusim obljubljeni najlažjo pot do obvladovanja esperanta ter poskusim opraviti osnovni tečaj in izpit na spletišču *lernu!*. Registriral sem se kot začetnik in si ogledal razne možnosti, ki jih ponuja spletišče. Odločil sem se, da se bom omejil le na učenje in preverjanje znanja.

Začne se z izbiro pod zavihkom *Tečajji* s klikom na osnovno stopnjo. Pot je enoznačna: preko uvoda lahko napreduješ preko tečajev *Biltoj kaj demandoj* (50 kratkih lekcij, test znanja vsakih 10 lekcij in zaključni test), *Ana Pana* (8 kompleksnih lekcij iz več delov, ki vsebujejo tudi dopisovanje z izbranim mentorjem), *Mi estas komencanto* (11 lekcij iz po 4 delov, ki vsebujejo slušno, pisno in govorno preverjanje ter učenje besed) in *La puzlo esperanto* (40 kratkih lekcij s primeri in vajami). Kdor predela te tečaje in vmes skoči še po kakšno pojasnilo v slovnici, ki je na razpolago, se lahko prijavi za izpit. Kdor se ne čuti dovolj trdnega, ima pod

zavihkom *Učenje* še veliko možnosti ponavljanja in reševanja dodatnih vaj za posamezna slovnicična pravila.

Za izpit ima kandidat na razpolago 50 minut (meni je zadoščala polovica tega časa). Izid izpita je znan v delčku sekunde, poleg pohvale dobi uspešni kandidat možnost naročiti brezplačni poskusni izvod esperantske revije.

Koliko časa je potrebno za osnovno stopnjo? Meril sem svoj porabljeni čas za računalnikom in sešteval ure. Za *Biltoj kaj demandoj* sem porabil 10 ur, za *Ana Pana* 11 ur, za *Mi estas komencanto* 5 ur in za *La puzlo esperanto* 8 ur. Še dve uri ponavljanja in izpit znese skupaj 37 ur učinkovitega dela.

Moja osebna izkušnja pa seveda ne velja za vsakega kandidata. Glede na mojo starost (blizu 70 let), predznanje računalništva (srednje), predznanje esperanta (nič tečajev, samoučenje s slovnicinimi pravili), znanje drugih jezikov (veliko jezikov pasivno, a perfektno le slovensko), in drugo splošno izobrazbo (klasična gimnazija, elektrotehnika, ekonomija) menim, da bi približno tak rezultat dosegel lahko vsak drug kandidat. Mlajši imajo boljši spomin, pa morda malo manj jezikovnih izkušenj. Iz tega lahko naredimo ugotovitev, da se je možno na *lernu!* naučiti osnovnega znanja esperanta za dobro pasivno razumevanje in zasilno komuniciranje (pisno in govorno) v okoli 37 urah učenja ali v enem do dveh mesecih v odvisnosti od razporeditve časa učenja.

Moram še dodati, da je bilo učenje na osnovni stopnji res prijetno in je čas pri računalniku kar prehitro minil. Seveda pa je treba imeti dovolj zmogljiv računalnik in hitre telekomunikacijske kanale, sicer je treba preveč čakati na odzive programa, zamenjave spletnih strani in podobno. Moj izbrani spletni mentor g. Johannes M. iz Nemčije je pisne naloge, ki sem mu jih poslal v pregled, vedno še istega dne popravil in napisal svoje komentarje.

Na osnovni stopnji so vse zgoraj omenjene lekcije in ustrezne spletne strani prevedene v slovenščino. Slovensko besedilo vsebuje množico napak od vsebinskih preko slovnicičnih do tipkarskih. Nekatere napake so nebitvene, saj motijo le slovensko uho in oko, nekatere pa zavedejo uporabnika, da se ali narobe nauči, kar je najhuje, ali pa da napiše narobe rešitev in mora zato popravljati svoje odgovore. Spodobilo bi se, da opažene napake popravimo, tako zaradi boljšega vtisa kot zaradi prihranka časa pri učenju. V zvezi s tem poglejte razpis v rubriki *Obvestila in pozivi*.

Če se bo še kdo odločil za učenje ali obnavljanje znanja na spletišču *lernu!*, je pristrčno vabljen, da meri porabljeni čas in zapisuje najdene pomanjkljivosti, da bomo lahko prispevali k izboljšanju tega koristnega brezplačnega programskega orodja. O.K.

Pogled v  
zgodovino  
gibanja

Raziskovanje o stari esperantski  
zgbank in verjetno prvem znanem  
slovenskem esperantistu

V zadnji številki Informacij / Informoj smo že najavili nadaljnjo raziskavo o turistični zgbanki v esperantu iz časov kraljevine Jugoslavije. Prišli smo nekaj korakov naprej, a še vedno manjka podatkov in dokazov o tem zanimivem letaku. Zato še vedno velja, da vabimo naše bralce, da sporočijo morebitne drobce informacij o nastanku in izdelavi te zgbanke, da bomo lahko izpopolnili zanimiv del naše zgodovine.

Zgbanka je natisnjena na finem brezlesnem belem papirju. Format papirja je 2x ležeči A4, prepognjen na pol ter še na tretjino. Tako je nastalo 12 pokončnih strani žepnega formata 20,7x10,5 cm. Na njih je črno-beli tisk besedila in slik, le obroba vsake strani je rdeča.

Besedilo je v celoti v esperantu. V besedilu je nekaj napak, ki verjetno izvirajo iz stavnice (pomanjkanje vseh potrebnih znakov in neznanje esperanta stavca). Ob besedilu je tudi 21 slik in 1 grafikon. Pod slikami so tudi napisi v esperantu. Le pod eno sliko je naveden avtor (V. Kramarič), ni pa jasno, ali je on avtor tudi ostalih fotografij. Kot zanimivost naj še povem, da je bil pod sliko Kranjske Gore prvotno napis Bohinjska Bistrica, napis pa so nato ročno prelepili s pravilnim imenom kraja.

Na zgbanki manjkajo vsi podatki o avtorjih, časuo izdaje, izdajatelju, nakladi in podobno. Nekaj tega se bo dalo še ugotoviti z analizo besedila in slik, pa tudi s pomočjo naših bralcev. No, pa pustimo to za prihodnjč.

V nadaljnjem je prikazano celotno besedilo zgbanke z manjšimi oblikovnimi in slovničnimi popravki. O.K.

## Somere tra Slovenio

(Drava banusejo, Reĝolando Jugoslavio)

Kiam okupas nin la korpa kaj anima laciĝo, ĉiutagaj zorgoj kaj la nedormemo – kiam ni estas premataj de somera varmego kaj polvo, tiam ni serĉu la ripozon en mirinda Slovenio (Drava banusejo) – en ĝiaj multnombraj kaj eminentaj banejoj, en ĝiaj nenombreblaj arbaroj kaj montaroj, je ĝiaj lagoj kaj kristalaj fontetoj, sur ĝiaj belaj stratoj.

En Slovenio (Drava banusejo) Vi povas ricevi krom la plej bona lakto kaj fromaĝo ankaŭ alian bonegan manĝaĵon, puregajn ĉambrojn kun eminenta servado laŭ la plej moderaj prezoj. Krom tio Vi estas en Slovenio frate akceptata, kio estas por la anima kvietigo la plej grava afero.

La ĉefurbo de drava banusejo (Slovenio) estas Ljubljana kun 70.000 da loĝantoj. Ljubljana estas sidejo de drava banusejo kaj de diversaj klerigaj, kulturaj kaj aliaj

institucioj. Tra Ljubljana serpentumas la rivero Ljubljana. En Ljubljana ekzistas multaj preĝejoj, inter kiuj estas unu protestanta. Baldaŭ ekestos, krom la kapelo, ankoraŭ la ortodoksa preĝejo. Jam ĉe la unua rigardo sur Ljubljanan oni vidas monteton, sur kiu regas la antikva kastelo (fortikaĵo). De sur la kastelo etendiĝas surpriza rigardo al Ljubljana, al ĝia ĉirkaŭaĵo, ĉirkaŭita de montarĉeno kun odorantaj pingloarbaroj, suĉaj paŝtejoj kaj belaj vilaĝoj. Fervojskomunikilaro kun Ljubljana estas abunda, aŭtomobila kaj aŭtobusa trafiko sufiĉe debranĉigita. Hoteloj estas en Ljubljana unuarauga. Granda estas la nombro de kafejoj kaj gastejoj. En ĉiuj estas ta manĝaĵo kaj trinkaĵo unuaklasaj kaj la prezoj tre malgrandaj.

Al ĉiuj, kiuj bezonas la kuracadon kaj someran ripozon, oni varme rekomendas viziti la belegan Slovenion. De tie ĉiu gastu foriros plene kontenta kaj li tute certe ankoraŭ revenos.

Drava banusejo, kuŝanta sudoriente de Alpoj, estas plene alpa lando. Ĝia surfaco estas 15.936 km<sup>2</sup>. De sur la suproj de ĝiaj plej altaj montegoj estas videbla la blua adria maro.

Maribor, jugoslava Merano, estas ĉirkaŭata de montoj, sur kiuj kreskas krom la aliaj vegetaĵoj, multfrukta ankaŭ la kaŝtano. La tuta parto ĝis Ljubljana – pro sia fruktarkulturo – povas nomiĝi en plena senco la plej bela fruktĝardeno. Ebenajo de Prekmurje kaj kamparo de Ptuj, la verda Pohorje apud Maribor, vinbermontetoj ĉirkaŭ Novo mesto kaj montara Gorenjsko – ĉio tio kaj la nacia komplezo, prezentas al ĉiu vojaĝanto kaj gastu plenan kontentecon.


Kiu veturas de Zagreb trans Zidani most kontraŭ Maribor, tiu devas esti ravita de belegaj pentrindaj lokoj, kiuj malkaŝas sin antaŭ li.

Ripozserĉanto, ne hezitu resti kelkajn tagojn en Slovenio! Tiu, kiu ŝatas alpajn lokojn aŭ serĉas en banejoj la kuracadon de malsanoj kaj de laciĝo, restu pli longe ĉe slovenaj lagoj, sur ĝiaj Alpoj kaj en ĝiaj kuracigaj lokoj.

Inter la somerrestadejoj brilas la somerrestadejo Bled, la somera rezidenco de jugoslava reĝo Aleksandro la I. Bled kuŝas apud la samnoma belega lago (fervojestacio Lesce-Bled sur fervojlinio Jesenice – Ljubljana, aŭ la stacio Bled-Jezero sur la fervojlinio Jesenice – Boh. Bistrica). Antikva kastelo, iam sidejo de eparĥo el Brikseno, kiel en fabelan vualon envolvita insulo kun preĝejo, proksimaj alpaj suproj de Triglav (2865 m), reĝo de jugoslavaj Alpoj, Stol (2236 m), Begunjšĉica k. t. p. prezentas en krono de vilaoj kaj hoteloj, ĉirkaŭantaj la lagon, impresan, neniam forgeseblan bildon. Pli antaŭen interne, kontraŭ Triglav, sonĝas profunde, en fabela montarsoleco sian miljaran sonĝon, malhela, de rokoj ĉirkaŭigita Lago de Bohinj. El ĝi ŝprucas Savica, juna Savo, kiel, se ĝi el eksploditaj rokoj malfermus en tumulta akvofalo sian vojon helen.



Belegaj alpaj lokoj kaj vintraj promenejoj estas: Mojstrana (650 m), saltejo (por saltoj ĝis 35 m), glitveturejo; Kranjska gora (810 m) kaj Rateče-Planica, rekomendindaj somerrestadejoj. Tiuj lokoj en la valo de Sava Dolinjka estas krom tio ŝatata vintrosporta regiono, unikaj romantikaj neĝokazoj, saltejoj, en la plej proksima tempo ideala skiregiono, elirpunkto por alpaj turoj al Juliaj Alpoj kaj Karavankoj; Bohinjska Bistrica (507 m), kuŝanta en la valo de Savo Bohinjka, estas somerrestadejo kaj amata vintrosporta loko, en apenaŭa estonteco plej taŭga skitereno, konvena por remado, por internaciaj aranĝoj, tre rekomendinda saltejo (salto eĉ ĝis 60 m); Jezersko (906 m), super la fervojstacio Kranj, estas verda loko el fabelo meze de Kamnikaj Alpoj (Grintovec 2558 m, Kočna 2475 m). Por alpaj turoj al Savinaj Alpoj oni rekomendas kiel elirpunkton, agrable situantan urbeton, Kamnik (381 m) apud Ljubljana kaj idilian Celje (70 km de Ljubljana aŭ de Maribor), iam sidejon de celjaj grafoj, nun ŝatatan somerrestadejon.



Zunanji dve strani zgibanke

Slovenio abundas je romantikaj banlokoj precipe en sia nordorienta parto kaj ĝuas pro tio sian mondfamon: Rogaška Slatina, la fervojstacio Grobelno sur la linio Maribor – Celje, por la malsanoj de stomako, intestoj, renoj, urino k. a., kaj Dobrna, 18 km de Celje (aŭto- trafikiko), unuavice por la virinmalsanoj, por la nervomalsanoj, kormalsanoj kaj reŭmatismo. De ceteraj sanigaj fontoj ni menciuj: Slatina Radenci apud Maribor, por la kor- kaj sukermalsanoj, Laško, Rimske Toplice sur la fervojlinio Celje – Zidani most kaj Dolenjske Toplice, ĉiuj tri por reŭmo- kaj sopirmalsanoj.

La manĝaĵo estas en Slovenio malkara. Prezo por loĝado kaj manĝado estas Din 45,- ĝis Din100,-. Hote- loj estas solidaj kaj puraj. Eĉ la malgrandaj urboj pose- das akvokondukilon, elektran lumon, telegrafon kaj telefonon.

Ĉiujn informojn donas senpage (ankaŭ esperant- lingve) kaj rapide la Asocio por fremdultrafiko en Slovenio (Tourist-Office, reprezentanto »Putnik«) en Ljubljana, Tyrŝeva cesta 1 kaj ĉiuj aliaj filioj de »Put- nik« en Jugoslavio.

La gastoj en Bled, Bohinjska Bistrica, ĉe lago de Bohinj, en Čateške Toplice, Dolenjske Toplice, Medija- Izlake, Rimske Toplice, Rogaška Slatina, Slatina- Radenci kaj en Topoljščica ricevas de jugoslavaj fervo- j, se ili restadis almenaŭ 10 tagojn en tiuj lokoj, ĉe reveno vojaĝrabaton, por la tempo:

- de la 1a de jun. ĝis la 30a de sept. 50%
- de la 1a de marto ĝis la 31a de majo kaj de la 1a de okt. ĝis 30a de nov. 75%
- de la 1a de dec. ĝis la 28a de febr. 100%.

Direktaj fervojkomunikiloj de rapidvagonaroj kaj fervojprezoj:<sup>1</sup>

Paris – Zürich – Innsbruck – Jesenice – Lesce-Bled:  
Fr. fcs 209,50; 141,40; 92, 50 + ŝv. fr 40,05; 28,10; 19,65 + Sg 113,20; 81,-; 45,20 + Din 59,-; 53,-; 32,-.

Berlin – München – Salzburg – Jesenice – Lesce-Bled:  
Rmk 75,40; 52,-; 34,90 + Sg 59,75; 43,40; 24,50 + Din 59,-; 53,-; 32,-.

Wien – Klagenfurt – Villach – Jesenice – Lesce-Bled:  
Sg 86,25; 62,20; 34,80 + Din 59,-; 53,-; 32,-.

Praha – Linz – Graz – Ljubljana:  
Kč 140,-; 93,40; 70,- + Sg 77,25; 55,70; 31,50 + Din 207,-; 179,-; 110,-.

Budapest – Mura-Keresztúr – Ljubljana:  
Pö 28,50; 21,40; 15,20 + Din 269,-; 232,-; 141,-.

Warszawa – Pietrowice – Břeclav – Wien – Ŝt. Ilj – Ljubljana:  
Zl 45,60; 34,20; 22,80 + Kč 135,40; 90,40; 67,70 + Sg 95,75; 67,90; 38,70 + Din 207,-; 179,-; 110,-.

Ljubljana – Lesce-Bled:  
Din 72,-; 63,-; 39,-.

<sup>1</sup> La supraj prezoj valoras por la Ia, Ila resp. IIIa klasoj.



Kion fari plu? Sciante la naskiĝlokon kaj la precizan daton, mi turnis min per letero al la Ĉefepiskopa Arkivo (Nadškofijski arhiv) en Ljubljana. Ili respondis, ke Egon Mosche estis baptita ĉe la paroĥejo de Sankta Maria (Župnija Marijinega oznanjenja), naskita ĉe la adreso "Kapuziner Vorstadt 79", la patro estis Mosche Alfons (advokato, katoliko), la patrino Anna Grumnik ktp. Ili eĉ trovis, ke la patro Mosche Alfons naskiĝis en 1839, ke la gepatroj de Egon geedziĝis en la sama paroĥejo en 1872 ktp. Mi sendis retmesaĝon al la paroĥejo kaj jam la sekvan tagon certa pastro ("pater Vid") telefonis al mi kaj informis min pri la familio de Egon. De la pastro mi eksciis, ke la patrino de Egon mortis jam en 1874, kiam Egon estis nur iom pli ol unujara. Alfons Mosche denove edziĝis al Terezija Ĉeško kaj al ili naskiĝis la filino Vera (1877) kaj la filo Erich (1881).

Post tio mi esploris en Interreto kaj trovis, ke la advokato Mosche menciigas tre ofte. Evidentiĝis, ke la patro de Egon estis persono publike tre aktiva. Mi havas hejme Kroatan Leksikonon kaj tiaspecaj personoj estas listigitaj en ĝi. Indis, do, trovi ion similan en Slovenio. Kaj vere, en Enciklopedio de Slovenio ekzistas artikolo pri Alfons Mosche. La enciklopedion mi tamen ne povis trovi en Osijek. Mi petis helpon de sloveniaj esperantistoj, sed eĉ pli akurate respondis al mia peto nacia biblioteko en Ljubljana (Narodna in univerzitetna knjižnica). Post nur 2 tagoj mi povis legi, ke Mosche Alfons (Ljubljana, 1839-1901) estis juristo kaj politikisto, studis en Graz, laboris kiel advokato en Slovenjgradec, kaj ekde 1869 en Ljubljana, en 1882 li elektiĝis membro de la ŝtata konsilantaro de Kranjsko (Kranjski deželni zbor) kaj agis ĉefe pri financaj aferoj, eldonis la revuon „Slovenski pravnik“ („Slovena Juristo“). Lia grava merito por lia popolo estis enkonduko de la slovena lingvo en tribunalojn en Slovenio. Oni konsideru, ke ĝis tiam en Slovenio (kiu ekzistis nek unuiginta, nek sub tia oficiala nomo!) oficialis kaj eĉ furoris la germana lingvo.

Kiel esplori plu? Post ekleziaj libroj la sekva logika paŝo estas tombejoj. Denove mi ne devis veturi al Ljubljana, ĉar informoj pri la mortintoj enterigitaj en la tombejo Žale troviĝas en Interreto. Sed tie mi trovis, ke el la tuta familio (Alfonz, Marija, Egon, Terezija, Vera, Erich ktp.) ekzistas nur la tombo de Alfred Valenta, la edzo de Vera! Kie estis ĉiuj aliaj? Ja definitive iuj el ili mortis ĝuste en Ljubljana!

Post plua esploro en la Reto, mi lernis, ke en Ljubljana ekzistis malnova tombejo de sankta Kristoforo (Sveti Krištof), kiu komence de la 20-a jarcento fermiĝis. Aperis tiam nova granda tombejo Žale kaj familioj iom post iom translokigis siajn mortintojn tien. Dum jardekoj restis la malnova tombejo neglekata kaj ruiniĝanta kaj eĉ novaj urbopartoj konstruiĝis tie. Tiel do malaperis certaj tomboj kaj kun ili parto de la historio de Slovenio. Sed kial la familio Mosche kaj Valenta ne zorgis

pri translokigo de siaj mortintoj? Mi tion komprenis nur multe pli poste.

Mi demandis la estraron de Žale pri la nomo kaj adreso de la persono kiu laste pagis la tenadon de la tombo de Alfred Valenta. Ili respondis, ke laŭleĝe ili ne rajtas diri tiujn informojn. Sed laŭ la konsilo de la (jam menciita) pastro Vid, mi skribis leteron al nekonata persono kaj petis la estraron de Žale, ke ili plusendu la leteron al tiu sama persono (kiu por ili estas konata). Ili diris, ke laŭ iliaj datumoj tiu persono verŝajne estas nenia parenco de Valenta, sed simple ia persono kiu aĉetis la tombon por sia familio. Mi kun granda peno verkis la leteron en la slovena lingvo, ĉar la nekonata persono tiam certe respondus pli bonvole. Mi opiniis, ke la letero estis en la bona slovena lingvo, sed tamen mi donis ĝin pro lingva kontrolo al la s-ano Tomaž Longyka. Li korektis ĝin, kaj mi nur tiam komprenis, ke mia stilo estis tre malkvalita! Nepre mi menciigu ankaŭ la s-anon Branko Vrbinc, kiu faris post mia peto iujn bazajn esplorojn. Sed lia respondo venis nur post longa tempo, kaj intertempe ĉion tion trovis ankaŭ mi mem. La leteron mi fine sendis al Žale kaj ili plusendis mian leteron kaj konfirmis al mi la sendadon. Sed neniu respondo venis. Ĉio vana. La sorto de la familio Mosche restis bone kaŝita!

Interrete mi trovis speciale interesan informon pri la familio Mosche. Apud la lago de Bled troviĝas ankoraŭ hodiaŭ la „Vilao Mosche-Valenta“. Post 1945 ĝin la ŝtato prenis (eble pli precize „forrabis“?) de la antaŭa posedantino Vera Valenta (nask. Mosche) kaj la nova nomo fariĝis „Vilao Prešeren“ (laŭ la grava slovena poeto). La vilaon konstruigis en 1869 Marija Grumnig kaj en 1889 donacis ĝin al d-ro Alfons Mosche el Ljubljana. En 1902 ĝin heredis „nobela Valenta Marschturn“ kaj en 1922 la posedanto fariĝis la menciita Vera Valenta ktp. Tiu teksto troviĝis en la paĝoj de la Vilao Prešeren. Sed ĝuste en la tempo de mia esplorado la vilaon la aĉetis al iu privata firmao, kiu ŝanĝis la paĝon. Malaperis ĉi tiuj historiaj informoj! Mi analizis: Alfonz mortis en 1901, do logike la filino Vera heredis la objekton en 1902, aŭ verŝajne ŝia edzo, kies familia nomo estis Valenta kaj li estis el nobela familio. (Temis pri Alfred Valenta, origine slovako, kiu estis fama kuracisto en Ljubljana.) Kaj en 1922 li verŝajne mortis kaj la vilaon prenis lia vidvino Vera, filino de Alfonz. (Fakte li mortis en 1926, trovis mi poste.) Mi telefonis plurfoje al Bled (muzeo, hotelo, turisma asocio), sed neniu aŭdis pri la iamaj posedantoj nek pri ilia sorto.

Rete mi iel trovis la kadastran numeron de la grundo de la vilao kaj informiĝis, ke la terposedaj informoj estas ĉe la tribunalo en Radovljica. La terposedaj libroj estas en Slovenio akireblaj per Interreto, post pago. Mi iel aranĝis la aferon kaj trovis tie la numeron de la dokumento el 1946, per kiu la vilaon prenis la ŝtato. La teksto estis: „na podlagi tus. odloĉbe z dne 6.9.1946, Zp 31/45-3 se vknjiži družbena lastnina“. Mi kredis, ke en

tribunala dokumento devas esti la adreso de ĉiu koncer-na persono, do ankaŭ tiu de Vera Valenta, dunofratino de Egon. Per tiu adreso mi scios, en kiu urbo serĉi la posteulojn de Vera. Kaj mi skribis al historia arkivo en Ljubljana (Zgodovinski arhiv Ljubljana) kaj fine ili trovis la dokumenton kaj tra legis por mi la adreson de Vera Valenta. Sed la adreso, malbonŝance, tekstis: „sedaj neznano kje“ (en tiu ĉi momento nekonata“). La sorto de Mosche-oj restis mistera.

Bonŝance, la arkivo en Ljubljana kaj ties sekcio por Kranj (Enota za Gorenjsko Kranj) rigardis kun simpatio al mia laboro kaj en sia reciproka kunlaboro trovis plurajn dokumentojn pri la familio de Egon, nur pri Egon mem troveblis preskaŭ nenio. La plej gravaj dokumentoj estis „restad-dokumentoj“ („Zglaševalne pole“), per kiuj mi definitive rekonstruis la familiajn rilatojn de ĉiuj konataj personoj kaj trovis iliajn naskiĝ-, geedziĝ- kaj mortodatojn ktp. Evidentiĝis, ke Erich poste translokiĝis al Vieno, ke Vera havis du filinojn (Ilse kaj Lörle), ke ili edziniĝis kaj foriris al Vieno ktp. Kaj de Egon nur informo pri la naskiĝjaro! Ĉu eble li denove foriris al Suda Afriko? En la koncerna informo de la viena arkivo mi vidis iun dokumento-numeron. Mi denove petis, ke ili trovu ion ajn rilatan al tiu dokumen-to kaj ili trovis korespondadon inter la patro Alfonz Mosche, aŭstria ministerio kaj ambasadejo en Londono. Tiam ja estis tie milito inter lokaj „buroj“ kaj anglaj koloniistoj. La zorganta patro volis per siaj konatoj peti ĉe la brita ŝtato liberigon de sia filo Egon, kiu ĉesis skribi hejmen kaj verŝajne estas kaptita fare de la angloj. (Jes, li estis!)

Paralele mi esploradis en Intereto. Mi trovis, ke la tombejoj en Vieno disponigas liberan enrigardon en liston de la mortintoj. Sed pli grave, mi trovis, ke ekzistas Digitala biblioteko de Slovenio (Digitalna knjižnica Slovenije). En tiu interreta biblioteko oni povas trovi multajn gazetojn el la historio de Slovenio. Estis tie „Dom in svet“, „Ljubljanski zvon“, „Laibacher Zeitung“ kaj multaj aliaj, ĉiuj skanitaj. Tiel vi povas legi ilin en via hejma komputilo, kvazaŭ vi legus la paperan originalon. Kaj, plej grave, vi povas entajpi en la serĉilon deziratan tekston (ekz. „Egon Mosche“) kaj la serĉilo tuj prezentas al vi liston de la unuopaj gazetnumeroj en kiuj aperas tiu teksto. Skanado (diĝitigo) de tiom multaj gazetoj estis certe kolosa laboro, kies gravecon ordinara homo nur tiam povas kompreni, kiam li serioze esploras la historion! Kaj Kroatio tiun laboron ankoraŭne faris.

Kion mi eksciis el la vienaj tombejoj? Ke tie ekzistas tombo de iu d-ro Alfonz Mosche (+1970), kaj samtempe de Mosche Erich (+1973) kaj Friederike. Denove strangaĵo! Ja Alfonz mortis en Ljubljana, kaj en 1901. Eble ia eraro? Fine mi aranĝis, ke mia konatino el Vieno foriru al la tombejo Zentral Friedhof. Ŝi legis el la tomboŝtono, ke la mortojaroj estas ĝuste tiaj. Do, ne temas pri la patro de Egon. Ĉu pri ia familiano, nepo

ktp? Sed tiu Erich mortis 4-jara, do ankaŭ li ne estas la ĝusta. Fine mi rezignis pri tiu tombo. Nur multe pli poste mi legis en la digitala biblioteko la artikolon el „Laibacher Zeitung“ de 11-a de aprilo 1883. Temas pri funebra anonco pri la avino de Egon (Maria Mosche). Tie estis listigita la tuta parencaĵo kaj mi definitive malkovris ĉiujn familiajn rilatojn. Alfons estis kuzo de Egon, t.e. filo de lia onklo Mosche Clemens. Kaj denove ĉio estis en la germana lingvo!

Pli interesa estis la viena tombo de certa Vera Valenta. Sed ĉu vere temis pri la (duon)fratino de Egon? Kiel konfirmi tion? Tiam mi rememoris la restad-dokumentojn el Ljubljana, kiuj menciis la filinojn kaj bofilojn de Vera. Ankaŭ iliajn nomojn mi trovis en la sama tombejo, eĉ en la sama tombo. Do, ĉio subite klara! Vera mortis en Vieno. Ne mirinde - se la komunisma ŝtato Jugoslavio forprenis de ŝi la bienon, verŝajne ŝi estis malbone traktata kaj devis elmigri! Nur restis la tasko trovi la familianon kiu pagas por tenado de la tombo, kaj tiam malvolviĝos kaj disbobeniĝos la tuta vivrakonto de Egon! Sed mi hezitis rekte telefoni al la viena tombejo, ĉar mi timis, ke ili glate rifuzos komuniki al mi ion ajn. Intertempe mi esploris telefonlibron de Aŭstrio serĉante la familian nomon Mosche. (Ne necesas diri, ke la libron mi konsultis interrete!) Estis nur kelkaj en Aŭstrio kaj mi telefonis al ĉiu el ili. Evidentiĝis, ke ili ne estas tre parencaj inter si kaj neniu sciis la devenon de sia familia nomo. Kaj neniu sciis pri Alfonz, Egon, aŭ Erich. Sed mi trovis iun s-ron kun la familia nomo Kaan, ĉar unu filino de Vera (Lörle, t.e. Eleonora) edziniĝis al certa Otto Kaan, samtombe enterigita kiel Vera. Tiu interesa sinjoro ne parenkis al Otto, sed li estis amatora historia esploranto. Li decidis helpi pro „kolegeco“ kaj iel li trovis la nomon kaj adreson de la persono kiu zorgas pri la tombo de Vera Valenta! Temis pri s-rino Ellen Kemmetmüller el Vieno. Tre bone, mi eksentis, ke la momento de malkovro tre proksimiĝas!

Mi telefonis al la sinjorino kaj poste ankaŭ al ŝia kuzino Ines Mancusi el Vieno, nepinoj de Vera Valenta. Ili kun siaj infanoj estis la solaj vivantaj posteuloj de Vera Valenta. Ili diris, ke ili bone konis sian onklon Erich Mosche, kiu mortis en Vieno en 1963, havante edzinon, sed neniun infanon. Do Ellen kaj Ines povus esti eĉ la solaj posteuloj de la advokato Alfonz Mosche, se eventuale Egon ne havis idojn. La s-rinoj rakontis, ke Vera estis en 1945 perforte forpelita el Slovenio, en iu vagono por brutoj kaj ke la familio postulas redonon de la vilao, ĉar ĝia preno estis „pura ŝtelo“ (Reine Diebstahl)! Sed pri Egon ili sciis nur tiom, ke li ekzistis („das es ihn gegeben hat.“). En la familio preskaŭ neniam oni parolis pri li. Se ili bone memoras, li foriris ien al Suda Ameriko. Kaj restis neniu foto aŭ letero de Egon, ĉar Vera devis ĉion forlasi en Bled. Nur iu olea pentraĵo estas ĉe Ellen, en kiu estis pentritaj Egon, Vera kaj Erich kiel malgrandaj infanoj ludantaj en ĝardeno,



sed iliaj vizaĝoj estas tre malklare videblaj tie. Konklude, mi rezignis kaj pri tiu foto, kaj pri tiuj du kuzinoj. Kaj mi kredis, ke ili mismemoras pri la geografio – devis ja temi pri Suda Afriko, ĉu ne?

Tiam mi resumis miajn rezultojn. Mi sciis pri la tuta familio kaj pri la posteuloj. Evidente nenia spuro de ili restis en Slovenio. Sed spuroj de Egon restis nek en Slovenio, nek en Aŭstrio. Eble en Sudafrika Respubliko? Malfacile exploreble kaj verŝajne vane, ĉar li ja revenis hejmen post la „bura milito“ tie. Kaj en la milito Egon batalis en la malĝusta (malvenkita!) flanko, kion konfirmis pluraj etaj artikoloj en sloveniaj gazetoj (ĉio trovebla en la Digitala biblioteko de Slovenio). Certe la angloj ne permesus al li reveni. Eble tamen Suda Ameriko? Mistero kaj mallumo! Ho, Egon, Egon, kie vi kaŝis vin? (*kontinuiĝos*)

### Komentiramo

Staliŝča in komentarioj za javno razpravo

## Staliŝče do organiziranja esperantske konference Alpe–Jadran v Izoli leta 2013

Izvrŝna odbora ZES in ETD sta loĉeno na svojih seĝah v zaĉetku oktobra letos ponovno obravnavala moĝnost organiziranja esperantske konference Alpe-Jadran v Izoli leta 2013. Zaradi okoliŝĉin gospodarske krize ter organizacijske in starostne strukture slovenskega esperantskega gibanja so bila zavzeta staliŝĉa, ki bi jih lahko povzeli takole:

- Gospa Fani Riĝnar ni bila pooblaŝĉena, da na konferenci Alpe-Jadran v Trstu ponudi organiziranje naslednje konference v Sloveniji leta 2013.

- ZES in ETD ne rozpolagata s finanĉnimi sredstvi in sponzorji za primerno organizacijo konference in za pokritje zelo verjetnih izgub take prireditve.

- Za ustrezo logistiĉno in programsko pripravu ZES in ETD v letu 2012 in 2013 ne moreta zagotoviti prostovoljcev, najetje takih storitev pa cenovno in kakovostno ni izvedljivo.

- Namesto konference bi bilo sprejmljivo enodneveno sreĉanje s premiŝljeno programsko vsebino in krajsim druĝenjem, saj predvideni krog udeleĝencev dobro pozna slovensko Primorje in ima do njega kratko pot. O.K.

## Membreco de SLEL en Eŭropa Esperanto Unio

La plenumkomitato de Slovenia Esperanto-Ligo traktis la rilatojn inter SLEL kaj EEU kaj konstatis, ke SLEL ne estas membro de EEU kaj ne havas reprezentanton en EEU. Jen la klarigo, konsiderante la Statuton de EEU: Dum la jarkunveno de SLEL en la jaro 2005 laŭ mempropono kaj nia fido por normala kunlaboro,

SLEL aprobis kiel reprezentanton de SLEL en EEU Zlatko Tiŝljjar, kiu pro tio povis fariĝi sekretario.

La prezidanto de SLEL Janez Jug ankaŭ sendis en 2005 skriban peton al EEU por membriĝo. SLEL neniam ricevis nek skriban aprobon de la akcepto de SLEL en EEU nek la fakturon por membrokotizo (art. 5 de la Statuto).

La reprezentanto de SLEL Zlatko Tiŝljjar estis en EEU elektita kiel sekretario - do estrarano. Sekve SLEL devus elekti novan reprezentanton, sed EEU neniam nin informis nek pri elekto de nia reprezentanto por sekretario nek pri necesa nova reprezentanto (art. 9 de la Statuto).

Dum la EEU Konferenco en Firence en 2006 tiamaj prezidanto de SLEL Tomaĝ Longyka kaj vicprezidanto Janez Jug kontaktis la prezidanton de EEU Sean O'Riain kaj plurfoje sekretario Zlatko Tiŝljjar por ordigi la rilatojn, sed sensukcese.

SLEL havas intereson por kunlaboro, se EEU obeos sian Statuton kaj montros seriozan intereson.

## Katastrofa z imenom in priimkom

V teh kriznih ĉasih se tudi esperantisti sreĉujemo z razliĉnima problemima. V Ljubljani je to izguba lastniŝkega prostora na Tavĉarjevi 2, kjer sta imela sedeĝ in delovala Esperantsko turistiĉno druŝtvo Ljubljana ter Zdruĝenje za esperanto Slovenije. Naŝ lastniŝki prostor je leta 2002 takratna predsednica druŝtva Draga Grabnar Zalar prodala privatniku F.D. Zato smo pred kratkim morali ĝe ĉetrtiĉ seliti vse arhive, knjiĝne zaloge, strokovno knjiĝnico, revije in ĉasopise ter preostalo opremo. Ob tem smo zaradi omejenega prostora morali odstraniti preko sto kilogramov revij in ĉasopisov, delno so se arhivi in knjiĝe poŝkodovali, povzroĉeni so veliki stroŝki, arhivi in knjiĝe so sedaj na ŝestih razliĉnih lokacijah, sedanji prostor skladiŝĉenja pa je zopet samo zaĉasen. Tako sta ETD Ljubljana in ZES ter gibanje v Sloveniji zaradi samovoljne in protizakonite dejavnosti posameznice resno ogroĝena in oŝkodovana.

Isti kupec je ĝe pred desetletjem druŝtvo ponudil v zamenjavo garsonjero v vrednosti 90 tisoĉ evrov, vendar takratno vodstvo s predsednikom Tonetom Logarjem tega ni sprejelo. Lastniŝki prostor je namreĉ druŝtvo kupilo s poĝrtvovalnim delom in prizadevanjem mnogih esperantistov iz cele Slovenije. Draga Grabnar Zalar pa je naŝ lastniŝki prostor njemu prodala za 24 tisoĉ evrov.

Sedaj sta obe organizacii brez stalnega prostora za delovanje, ogroĝen je celotni arhiv in knjiĝe, odtujena skoraj vsa oprema, s kupnino pa v Ljubljani ni moĝno kupiti niti sobice. To so posledice samovoljne in protizakonite dejavnosti Drage Grabnar Zalar. In zato naj

ima sedanja prostorska katastrofa znana ime in priimek!  
*IO ETD*

Aldone jen artikolo, ke eble esperantistoj ne-slovenaj pli bone komprenos nian problemon:

## Katastrofo de sidejo en Ljubljana havas personan nomon

En tiuj krizaj tempoj ankaŭ esperantistoj frontas diversajn problemojn. En Ljubljana la plej granda problemo estas perdo de propra sidejo en Tavčarjeva 2, kie havis sidejojn E-societo Ljubljana kaj Slovenia esperanto ligo. Nian propran ejon en la jaro 2002 tiama prezidantino Draga Grabnar Zalar vendis al privatulo F.D. Tial ni antaŭ nelonge jam la kvaran fojon devis translokigi kompletajn arkivojn, librostokon, revuojn kaj ekipaĵojn. Samtempe pro limigo de nova depono ni devis forĵeti pli ol cent kilogramojn de malnovaj revuoj kaj gazetoj, la arkivoj kaj libroj estas pro translokigoj parte difektitaj, aperas novaj elspezoj kaj finfine ĉimomente troviĝas en ses diversaj lokoj. Tiel la E-societo Ljubljana kaj Slovenia esperanto ligo pro memvola kaj kontraŭleĝa ago de tiama prezidantino spertas grandan domaĝon kaj seriozan danĝeron por sia aktiveco.

La sama privatulo, kiu aĉetis ejon, jam antaŭ jardekoj por nia ejo proponis interŝanĝe kompletan garsonjeron valoran cca 90 mil eŭroj. Sed tiama gvidantaro de societo, kiun gvidis Tone Logar, tiun proponon ne akceptis. Nome propran ejon la societo aĉetis kun helpo kaj sindona kunlaboro de esperantistoj el tuta Slovenio. Kaj tamen la iama prezidantino en la jaro 2002 vendis nian sidejon por 24 mil eŭroj.

Tial nun ambaŭ organizoj estas sen sidejo, endanĝerigita estas aktiveco, diversloke deponitaj arkivoj, kaj per tiu mono en Ljubljana oni eĉ la ĉambreton ne povas aĉeti. Do tio estas sekvoj de memvola kaj kontraŭleĝa agado de iama prezidantino Draga Grabnar Zalar, kaj tial la sideja katastrofo en Ljubljana havas personan nomon.

Nika Rožej kaj Janez Zadavec

Obvestila in  
pozivi

Za somiŝljenike ter ĉlane ZES in  
ETD Ljubljana

## KER ekzamenoj

Ĝis 2009 esperantistoj povis ekhavi nur movadajn diplomojn kaj agnoskojn pri lingvokono, kiujn ŝtataj instancoj ignoras, ne akceptas kiel aliajn ŝtate agnoskatajn.

Jam la kvaran jaron esperantistoj havas la eblon ekzameniĝi kadre de la Komuna eŭropa referenckadro

(KER) kaj tiamaniere havigi la dokumenton, kiu validas same kiel ekz. diplomoj de la Goethe instituto aŭ Oxford centro, do egalrange kun aliaj lingvoj ekster la movado. Ni kun tiu sistemo estas tute oficiale registritaj en Strasburgo ĉe Konsilio de Eŭropo, starigis ĝin ALTE (Asocio de lingvotestistoj de Eŭropo) kaj la diplomo devas esti agnoskata de iu ajn instanco de Eŭropo.

La ekzameno pritaksas la nivelon de la kvar bazaj lingvokapabloj. Dum la parola parto la parolkapablon kaj la aŭdan komprenon, dum la skriba la skribkapablon kaj la legan komprenon kune kun gramatikaj konoj. Ĝi estas unulingva ekzameno, do ĝi ne taksas la kapablon pri tradukado, kaj ĝi estas proponata je tri niveloj, baza, meza kaj supera, kiuj konformas al la priskriboj de la KER je B1, B2 kaj C1.

Post la 30 sesioj ĝis aŭgusto 2012 trapasis la ekzamenojn 986 homoj el 60 landoj, plej multe el Francio kaj Brazilo. Ne multe, ankaŭ pro tio, ĉar ekzamenoj ne estas fareblaj ĉie, kie estas intereso, ĉefe pro la tre komplikaj reguloj. Por komenca periodo eblas ekzameniĝi dum Universalaj kongresoj kaj pli grandaj E-aranĝoj. Ĉi jare tiaj estis en Hajnano - Ĉinio (Somera universitato), Hanojo - Vjetnamio (Universala kongreso), Nitra - Slovakio (Somera esperanto semajno,) kaj Mazardelvalo - Sicilio (Itala esperanto kongreso), la sekva estos komence de decembro en Moskvo - Rusio (speciala ekzamena semajnfino).

Tamen, la 9-an de junio okazis ĉi jare la unuan fojon la tutmonda skriba sesio. Eblis skribe ekzameniĝi ĉiuloke en la mondo, kie okupiĝis almenaŭ kvin kandidatoj. Aliĝis 380 kandidatoj en 29 lokoj de 16 landoj dise en la mondo kaj ĉiuj samtempe partoprenis la skriban ekzamenon.

Kelkaj el ni dirus, ke ni ja ne bezonas la diplomon pri scio de esperanto. Multaj kapablas paroli pliajn fremdajn lingvojn, estas eĉ profesoroj pri lingvoj, do, kial diplomiĝi pri esperanto? Se ne por pruvi al ni mem, ni pruvu al "ekstera mondo", ke esperantistoj estas pli ol hobia movado, ke ni regas nian lingvon je certa nivelo, ke kiel lingvo komunumo ni havas propran kulturon kaj altan nivelon de edukiteco. Ni flegu nian lingvoscion, ekzameniĝu kaj helpu la altiĝon de la prestiĝo de nia komunumo!

Do, ĉu ni eluzos la eblojn de KER ekzamenoj? Eble dum la Tutmonda ekzameno, kiu preskaŭ certe okazos ankaŭ venontjare. Ni havas ankoraŭ sufiĉe da tempo por prepariĝi.

La materialon por la artikolo mi ĉerpis el la ttt-ejo de Edukado.net, kie vi povas trovi multajn detalojn pri la temo, ankaŭ specimenojn de ekzamentestoj, memtaksojn, statistikojn ktp. Kun eblaj aldonaj demandoj vi turnu vin al la redaktoro. *Zdenka Rojč*

## Nagradni razpis

Da bi spodbudili učenje in obnavljanje znanja esperanta s pomočjo spletišča *lernu!*, razpisujemo nagradno iskanje napak v slovenskih besedilih na *lernu!*. Naloga kandidatov za nagrado je, da najdejo v slovenskih besedilih tečajev, razlagah slovnice, vaj in podobnega najmanj 30 napak (vsebinskih, slovničnih, tipkarskih itn.). Za vsako najdeno napako je treba navesti mesto napake in pravilni prevod (na primer: Ana Pana 4 / besede / vegetare = vegetarijansko). Napačni predlogi popravkov bodo odšteti, zato naj bo seznam predlogov popravkov malo širši! Seznam napak je treba poslati po elektronski pošti na naslov uredništva [info@esperanto.si](mailto:info@esperanto.si)

**najkasneje do 15. januarja 2013.**

Najhitrejši pošiljatelj ustreznega seznama napak si bo za nagrado lahko izbral eno poljubno knjigo iz knjižnih zalog ZES. *IO ZES*

### Članarine ZES in ETD

Prosimo vse člane in podpornike, da redno plačujejo članarino tudi zaradi evidentiranja vaše aktivnosti kot članov oz. članic ZES ali ETD. Plačevanje preko transakcijskega računa naj bo le izjema, če se res ne morete udeležiti naših srečanj, sicer pa si želimo vaše fizične prisotnosti, da se čisto ne odtujimo v tem svetu hitrosti in elektronskih komunikacij.

Članarina ZES znaša letno 12 € za zaposlene, 6 € za študente, upokojence in brezposelne ter 0 € za mlade do 18. leta. Članarino za leto 2012 ter morebitne zaostale članarine ter prostovoljne prispevke lahko plačate na sestankih ali na poslovni račun ZES pri NLB št. SI56-0201-5001-2704-490 z obrazcem UPN. Kot kodo namena vpišete »otr« in namen plačila: »priimek, članarina in ustrezno leto oz. obdobje«. Pri referenci vpišete kodo »99«, ostalo pa pustite prazno.

Članarina ETD znaša letno 6 € za zaposlene, 3 € pa za brezposelne, upokojence in študente. Za mlajše od 18 let je članstvo brezplačno. Članarino za leto 2012 ter morebitne zaostale članarine ter prostovoljne prispevke lahko plačate na sestankih ali na poslovni račun ETD pri Delavski hranilnici d.d. Ljubljana št. SI56-6100-0000-1703-764 z obrazcem UPN. Kot kodo namena vpišete »otr« in namen plačila: »priimek, članarina in ustrezno leto oz. obdobje«. Pri referenci vpišete kodo »99«, ostalo pa pustite prazno. *O.K.*

## Razširjen seznam literature za prodajo

Ob preselitvi arhiva ZES in ETD ni bilo časa za inventuro zalog slovarjev in učbenikov, strokovne literature o esperantu in v esperantu, mladinske in ostale beletristike v esperantu ter propagandnega gradiva. Načeloma so vse knjige, ki jih imamo v več izvodih (en izvod mora biti hranjen v knjižnični zbirki), na razpolago za prodajo. Dosedanjemu naboru smo že dodali nekaj naslovov, ki bodo zanimivi za naše člane in druge interesente, na primer 1. del učbenika Rudolfa Rakuše, slovenski učbenik po zagrebški metodi iz leta 1981 (priredila Sonja Tavčar), potopis po Nepalju Tiborja Seklja itn. V spodnji tabeli je začasen pregled novejših in zanimivih starejših naslovov, ki jih imamo na zalogi, in njihove prodajne cene. .

Naslovi knjig:	Cena (€)
<b>Učbeniki in slovarji</b>	
Slovensko - esperantski slovar (Petrič)	15,00
Esperantsko - slovenski slovar	15,00
Esperanto za šole in tečaje I. del	12,00
Esperanto za šole in tečaje II. del	9,00
Metodiko de la Esperanto-instruado	4,80
Učbenik esperanta / Esperanto-lernolibro (Štimac in drugi, pr. Tavčar)	1,00
Gvidlibro por supera ekzameno	4,80
Elementoj latinaj en Esperanto	1,00
<b>O esperantskem gibanju</b>	
Mednarodni jezik esperanto in jezikovna demokracija	1,00
Gradivo za zgodovino gibanja	3,00
Ljudje in dogodki v gibanju za mednarodni jezik esperanto v Sloveniji	5,00
Mednarodni jezik: realna ali nerealna utopija (Zamenhof in drugi, pr. Ošlak)	16,50
Zamenhof – oče esperanta	9,00
<b>Leposlovje</b>	
Sonetni venec / Krono de l' sonetoj	4,00
Panjo – pesmi J. Seiferta	2,00
Nepalo malfermas la pordon (T. Sekelj)	6,00
La ŝtelita lampo	2,50
La varma rivereto	1,00
Pantoflokato	2,00
Mojca etulino	2,00
Mia ombrello povas esti balono	2,00
Neĝulino	2,00

Združenje za esperanto Slovenije omogoča članom in drugim zainteresiranim osebam in organizacijam kupiti posamezne esperantske knjige ali večje količine iz svojih zalog na svojih srečanjih ali pa tudi po elektronski pošti na naslov [info@esperanto.si](mailto:info@esperanto.si). Naročene knjige


lahko kupci po plačilu prevzamejo na društvenih sestankih ali pa jih pošljemo po pošti. O.K.

## (P)osebne znamke ETD Ljubljana

Bližajo se božični in novoletni prazniki in s tem čas pošiljanja čestitk. Ali imate prijatelje esperantiste v Sloveniji ali tujini? Ali poznate navdušene filateliste? Zdaj je priložnost, da za majhen dodaten strošek (okoli pol €) naredite prijateljem veliko veselje in hkrati opozorite na našo dejavnost. Zato lahko na pošiljkah uporabite jubilejne znamke ob 90-letnici organiziranega esperantskega gibanja v Ljubljani.

Te osebne znamke so še na zalogi in sicer vrsta A za Slovenijo po 0,75 € in vrsta C za tujino po 0,90 €.

Kupili jih boste lahko še pravočasno na srečanju ob Zamenhofovem dnevu v Ljubljani, sicer pa po dogovoru z blagajnikom društva. O.K.



Predstavljam še nekaj prodajnih »novosti« v zalogi

## Kaj pripravljamo za naslednjo številko?

Pripravljani so že trije večji prispevki:

- drugi del zgodbe o prvem slovenskem esperantistu
- prevod študije o teoriji razširjanja esperanta
- esej o organiziranosti E-gibanja pri nas v bodoče.

Gotovo bomo lahko z besedilom in slikami poročali o Zamenhofovem dnevu v Ljubljani in morda še kje drugje.

Vabimo k pošiljanju daljših ali krajših prispevkov, fotografij in drugega gradiva, ki ga bomo skušali vgraditi v Informacije / Informoj ali na spletišče ZES.

Zlasti bomo veseli odzivov na raziskave zgodovine E-gibanja pri nas (turistični letak, Egon Mosche) in na nagradni razpis v zvezi z *lernu!*. O.K.

## Za zabavo Anekdotoj pri konataj personoj

Iu juna komponisto demandis de W. A. Mozart, kiel oni devas komponi sinfoniojn.

“Vi estas ankoraŭ juna, provu verki baladojn,” konsilis al li Mozart.

“Sed vi, majstro, komponis sinfoniojn jam kiel dekdu-jara...”

“Jes, sed mi neniun demandis, kiel mi tion faru.”

Kiam Charlie Chaplin estis petita diri sian opinion pri parizanoj, li diris ĝin tiel ĉi:

“Kiam parizano estas dudekjara, ŝi estas admireginda. La tridekjaraj parizanoj estas nerezisteblaj. Kaj kiam ili estas kvardekjaraj, ili estas ĉarmegaj.”

“Kaj la parizanoj super kvardek?”

“Pardonu afable, sed tiaj ja tute ne ekzistas,” protestis Chaplin.

Kiam la verkisto Ernest Heminway revenis el Afriko, vizitis lin la raportisto de iu bostona gazeto kaj demandis lin inetralie:

“Ĉu estas vero, ke sovaĝaj bestoj ne atakas homon, kiu portas brulantan torĉon?”

“Jes, ĝi estas vero – se la homo portas la torĉon sufiĉe rapide.”

Fonto: Gaja kajereto 1, Bratislava, 1978.

**INFORMACIJE / INFORMOJ** izdaja / eldonas Zdrúženje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Štefanova 9, SI-1001 Ljubljana, Slovenija / Slovenio. <http://www.esperanto.si>. Matična št. / kodnumero 5058384. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777. Poslovni račun / bankkonto: IBAN SI56 0201 5001 2704 490 pri / ĉe Nova Ljubljanska banka d.d.. (Swift-kodo: LJBAS12X). Uredil / redaktis mag. Ostoj Kristan.